

Alicja Lewanderska-QUEDNAU

Pri konsultacio kaj helpmaterialoj por tiu-ĉi artikolo la aŭtorino dankas al:

*,(+)*Dekano Prof. d-ro habT. Tyblewski.

(+)) Prof. Janus di Censo (R- It), d-ro Dirk Willkomen (DE) kaj d-ro Marcel Deforge (el sekcio EU de BEF).

ENKONDUKAJ INFORMOJ PRI EŬROPO

En PIV-o oni legis, ke Eŭropo (estas) la plej malgranda el la kvin partoj de la mondo, okcidente de Azio kaj norde de Afriko. Kvankam ĉiuj respektas la PIV-on, tamen oni devas la difinon iomete modernigi.

Dum kelkaj prelegoj kaj sciencaj renkontiĝoj O. Prof d –ro. hab. Prezidanto de AIS-o Helmar Frank-kreinto de ideo pri eŭrologio kiel scienco ankaŭ precizigis la difinon, do mi baziĝante sur lia opinio konkludas kaj daŭrigos la aferon provante uzi ilin por preparado de helpmaterialoj al AIS-studentoj.

Laŭ pura geografia vidpunkto - Eŭropo estas nur apendico de Azio. Tamen pro la granda kultura heredaĵo de tiu mondparto oni nomumis ĝin propra kontinento. Laŭ tradicio oni difinas la Uralon kaj Kaukazon -la limon inter Eŭropo kaj Azio. Tamen vera geografia limo inter Eŭropo kaj Azio ne ekzistas. Nur per interkonsento oni difinis la linion. Tiu limo estas nur artefarita, kaj se oni sekvus la sloganon “Unuiĝinta Eŭropo inter Atlantiko kaj Uralo”, oni distranĉus Ruslandon, pri kio prave atentigas Profesoro H. Frank. Vere inter la regionoj : oriente kaj okcidente de Uralo ne estas diferenco..

Ekde ĉiam la homoj strebas kaj revas pri vivo en trankvilo, sekureco kaj paco, en amikecaj rilatoj kaj paca unuiĝo kaj ekzisto de forta komuna – sekura lando ekz. en Eŭropo. Tamen la realeco formas la faktojn, kaj kaŭzas efikon pli ofte politikaj ambicioj de regantoj, pro tio ne ĉiam kaj ĉie la kunigado okazis paca kaj libervola. Kaj eĉ post paca komenco aperas faktoroj, kiuj detruas kaj ruinigas jam ekzistantajn komunumojn.

Dum lastaj jaroj en historio de nuntempa Eŭropo aperis strebado al procezo de integriĝo kaj unuiĝo. Tamen apud granda espero kaj entuziasmo aperadis duboj, malfacilaĵoj, stimulaj elementoj – krome eĉ bataloj kaj militoj.

En majo 1999 j venis al mi la letero tre trista. Nun mi citas kelkajn frazojn, la tutaĵon mi aldonas al la fino en ĉapitro - aldono.

Ĝi i. a. tekstas: “Estas malfacile skribi al vi dum ĉi-tiuj tagoj, sen funkciigi latentajn larmofontojn (...) Mi hontas, ke la vivo-ventoj portis ankaŭ min al ĉi-tiuj *civilizo kaj demokratio* - tio eĉ en sonĝo plej inkuba ne estis antaŭvidebla”. (...)

KONCEPTOJ KAJ PROVOJ PRI EŬROPA INTEGRIGO

(historia skizo)

Pri kreado de konceptoj de eŭropa integriĝo estis pluraj provoj. Laŭ sciencaj verkoj, la provoj ekzemple en Pollando aperis komence de XV jc. Ili ekestis baze de Jagelona Universitato (wszechnica), kiel (koncyliaryzm - konciliarismo); baziĝis ĉe koncilio de ŝtatoj kaj popoloj. Polaj politikistoj kaj sciencistoj strebas krei modelon por komuna, konkorda ekzistado i. a. de slavoj kaj ankaŭ hungaraj kaj rumanaj nacioj en unu Eŭropo.

Do, komence oni proponis unuigon de Pola Respubliko kaj sekve la komunumon de ŝtatoj en Eŭropo. Konciliarismo havis influon al Soboro en Konstancio, kaj ĉefaj taskoj estis unuigo de Slavoj pere de Federacio de Eŭropaj Ŝtatoj.

Laŭ pola racia sciencisto St. Staszic (legu Stašic) ekestu unu reganto, la nacioj kreŭ (guberniestroj - wielkorządca) kaj ĉiuj nacioj elektu la vicregantojn (rady Namiestnicze). Post ideo de Staszic aparadis mistika romantismo, kun la ideo de sendependeco kaj universalismo. Tre grandan influon havis la mondkonceptoj de J.M. Hoene-WROŃSKI (pola filozofo, kiu verkis germane). Lin fakte oni nomumis la patro de unionisma filozofio. (Unionismo - unuiĝo, konformismo, UNIO – politika unuiĝo de ŝtatoj, kiuj konsentas pri la komunigo de iaj partoj de sia regpovo).

Wroński proklamis, ke devas esti simila rilato

Dio - Homo

Societo - nacio.

Laŭ li simila unio devas kunigi laŭ la modelo: individuo kun socio (civito) kaj nacio, ankaŭ nacioj al internacia komunumo.

La unio de nacioj povas antaŭe, laŭ li, ekzisti tiel, kiel la federacio de frataj naciaj familioj - ekzemple en Eŭropo Meza kaj Orienta (La Federacio de Slavoj). Li sugestis, ke la centro estos Rusio. Tamen pro tio necesas, ke Rusio antaŭe devas kunigi sin en federacion kaj poste ekesti kiel partoj de nacioj : pola, litova kaj bialorusa. Konceptoj de Staszic kaj Wroński estis sendependaj.

Pri la koncepto de Wroński interesiĝis la rusa caro Aleksandro, kiam li kunigis la militistaron polan kaj litovan kun rusa sub la gvido de Granda Princo Konstanto. Sed li nur preparis la panslavan ideologion sub la gvido de Rusio, nenion plu.

Wroński, kaj poste B. Trentowski (en verko: Grundlage der Universalen Philosophie) pripensis la t. n. unuiĝon de Slavoj. Por unuiĝintaj Slavoj agis ankaŭ la framasona loĝio de Pestel. Sekvis lin ankaŭ K. Libert (filozofo), kiu la 2-an de junio 1948 partoprenis en la Panslava amsembleo (dieta) en Prago. (Dieta – nomo de parlamento aŭ politika kunveno en kelkaj eŭropaj landoj - en ekonomio –vojaĝmono, vojaĝpago). En Prago kunvenis 340 delegitoj, kiuj estis reprezentantoj de nacioj el la aŭstra monarĥio (ĉeĥa, slovaka, pola, ukraina, kroata, slovena). Dum tiu kunveno F. Palacky el Ĉeĥio- proponis translokigadon de la agadcentro el Rusio al Ĉeĥio kaj bazigadon sur la Habsburga dinastio.

En 1867 en Lausanne okazis la Internacia Pac-Kongreso, al kiu venis ankaŭ la grupo de la Virina Internacio. La ĉefa rezulto estis konstruo de Ligo pri Paco kaj Libereco kiu havas sidejon en Brno, kun la oficiala Ĵurnalo “Les Etats Unis d’Europe“.

En XXjc forta estas la ideo de Panslavismo fare de Paderecki kaj Masaryk. Post la 1917 j la usona prezidanto W. Wilson proponis al Paderewski, prepari memorandumon pri Eŭropo Meza kaj Orienta - kiel du federacioj de kiuj oni poste kreu Unuiĝintajn Ŝtatojn de Okcidenta Eŭropo (ENTENTA) kaj Ŝtanojn Unuigitajn Polajn (United States of Poland). La 5-an de novembro 1919 imperiestroj de Germanio kaj Aŭstro-Hungaria promesis krei de landoj, deprenitaj el Rusio - Polan Reĝlandon kun dinastia reĝo. Tamen alia grupo de polaj politikistoj revis pri daŭrigo de aŭtonomio ene de Rusio (Leroy – Beaulien : L’Empire des Tsars el les Russes).

En la periodo inter la du mondmilitoj aperis dispartigo en Eŭropo en komunista Sovetunio kaj, engaĝitaj al Ligo de Nacioj, restoj de eŭropaj ŝtatoj. Krome aperis ankaŭ Jugoslavio, kiel federacia lando, kaj t. n. Eta Entento (petite entente).

En Ligo de Nacioj tre aktive agis grafo R. Coudenhove–Kalergi (filo de aŭstro-hungara diplomato kaj japanino el brabantia familio kunigita kun Kreto). Li eldonis en j.1923 verkon : ”Paneŭropa“ kaj kreis la paneuropean Union kun sidejo en Vieno.

La unuaj prezidantoj estis : J. Seipel kaj K. Renner (posta aŭstra kancelestro). Laŭ la planoj de Coudenhove-Kalergi, Paneŭropo kiel federacio devas esti en eŭropa kontinento de Portugalio sen Sovietunio, laŭ li - azia lando.

La fundamento de Paneuropo devas esti la alianco (koalicio) franca-germana kun forta kunigo al Ligo de Nacioj. Kiel simbolon li proponis “Ruĝan Krucon” sur ora suno.

Rapide aperis la naciaj komitatoj de Unio en Belgio, Bulgario, Estonio, Finnlando, Francio, Grekio, Hungario, Jugoslavio, Latvio, Litovio, Norvegio, Germanio, Nederlando, Ĉeĥio, Luksemburgio, Rumanio kaj Pollando.

La Unua Paneŭropa Unia Kongreso okazis la 4-an de junio 1926 en Vieno, ĉeestis dumil delegitoj el 24 ŝtatoj, oni elektis al la honora prezidanto francan premieron Aristide Briand kaj centran Konsilion Paneuropa Unio. En tiu periodo tre agema estis ankaŭ Gustav Stresemann – germana ministro pri eksteraj rilatoj. Stresemann prenis por bazo de la ekstera politiko la repacigon kaj kunlaboron kun Francio (Briand konkordis al la akcepto de Germanio al la Ligo de Nacioj 1926)

La 6-an de septembro 1929 A. Briand proponis memorandumon pri Ligo de Nacioj kun la projekto de federacio de Eŭropaj Ŝtatoj. Estis la Konsilio (loĝo supra de ŝtatoj) kaj federacia Unuiĝo (delegitoj el ŝtataj parlamentoj), sekretario kaj federacia juĝejo.

Bedaŭrinde pro internacia ekonomia krizo la projekto estis neakceptata de Italio kaj Germanio (Hitler)